Henriette Luise von Hayn,

Ĉar ŝafeto estas mi

tradukita de Manfred Retzlaff

1. Ĉar ŝafeto estas mi
De Jesu', nur ĉiam pli
ĝojas mi, ĉar Li sufiĉe
Min gastigas, jes tre riĉe;
Mian nomon konas Li,
Amas min ja tiu ĉi.

2. Kaj sub Lia paŝt-baston'
Ĉie estas por mi bon';
Kaj mi sentas grandan ĝojon,
Ĉar min gvidas ĉiun fojon,
Kiam eksoifas mi,
Al la freŝa fonto Li.

3. Ĉu ne estu gaja mi?
Ĉar post tiu vivo ĉi
Kiel bona ŝafpaŝtiso
Portos min Jesuo Kristo
Hejmen al la kara Di'.
Amen, ja feliĉas mi!

Traduko de la Germana poemo "Weil ich Jesu Schäflein bin" de Henriette Luise von Hayn en Esperanton de Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1985-04-28.*

MR-183.2a / Arg-685-1380 (2012-11-27 22:18:48)

Vidu ankaŭ: `http://www.lutheran-hymnal.com/german/agerman_tlh.html` *kaj* `http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/weilichj.html`.